

Kiel Esperanto Povas Komprenbligi Rubgoldbergilojn

[\(Jump to English version\)](#)


Karaj gesamideanoj —

Mi tre interesas en la esprimaj povoj de Esperanto. Ekzemple, nia Esperanto enhavas lingvan ekipaĵon por esprimi kaŭzajn rilatojn, specife la sufikson "-igi".

Multe konata estas la nomo de Rube Goldberg (1883-1970), usona karikaturisto kies imagaj maŝinoj laboris simplajn taskojn per kompleksaj aparatoj. Ili estas absurdaj ekzemploj de serioj de kaŭzado.

Dum la tagmezmanĝo, se kelkaj gutoj de supo falus sur onian mentonon, tradicie la sola rimedo estis viŝi (purigi, sekigi) sian propran mentonon per buŝtuko. Sed nun, dankon al la inventaĵo de Goldberg — montrata en la artikolo pri li en la anglalingva [Wikipedia](#) — oni povas "viŝigi" la buŝtukon aŭtomate.

Sed ne nur tio! En la menciita aparato, tio kio viŝigas la buŝtukon estas horloĝa svingilo. Kaj kio svingigas la svingilon estas rikoltileto (ĝi tranĉas ŝnuron, permesante la svingan movon). Ĉi tiel, oni povas diri ke la rikoltileto "vi ŝ-ig-ig-as" la buŝtukon de la supmanĝanto. Ĝi pur-ig-ig-ig-as kaj sek-ig-ig-ig-as lian mentonon.



Kaj tiel plu. En la karikaturo de Goldberg, la raketo viŝ-ig-ig-ig-as. La cigarfajrileto viŝ-ig-ig-ig-ig-as. La siteleto viŝ-ig-ig-ig-ig-ig-as. Sume, la kulera ago de la supmanĝanto viŝ-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-as la buŝtukon -- proksimume. Kion desegnis Goldberg estas viŝ-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ilo

Ĉi tion tute esprimi angle estus malgraciege, sed Esperante ĝi estas tiel eleganta kiel "viŝ-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-ig-i"!

Tiel, nia Esperanto povas faciligi nian komprenon de la kompleksaj rilatoj inter eventoj.

Via, amuze,
Lee Hartman
Carbondale, IL